

# la Espero


1991:3

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN



**Svedaj esperantistoj kongresis  
en Gotenburgo**



## Anoncetoj

Varsovia Esperanta Turistoficejo, Maciej Piegat, PL-01 914 Varsovio, Dantego 1-B/48, Pollando, organizas ĉiaspecajn turismajn aranĝojn. Bv uzi la supran provizoran adreson.

Bezonas subtenon en formo de libroj, revuoj kaj aliaj donacoj la nova esperanto-organizaĵo en Albano: Albana Esperanto-Ligo, Gafur Muĉo, Rruga "Thanas Ziko", Nr 56, Tirana, Albanio.

Sovetia ekonomia instituto volas havi komtakton kun similaj institucioj: SU-343203 Slavjansk Doneck-oj obl, abon. jaŝĉik 10, Instituto de Menegeroj, Esperanto-fako.

### Dezirata korespondi:

Japanaj 12-15-jaraj studentoj: Shin Nishimoto, 121-1 Yamabushi Shimokayagu, Jimokuji Ama Aichi 490-11, Japanio.

## Donacoj

Claes Göran Ingestedt, Vällingby 400. Tore Fors, Billegerga 200.

**Loterio de tuko dum la kongreso:** Aino Åberg, Göteborg 2000.

**Klubo Cent:** Tore Johansson, Kalmar 100. Signhild Johansson, Kalmar 100. Gävle Esperantoklubb 100. William Malmsten, Göteborg 100. Arvid Johansson, Huskvarna 100. Ivar Andersson, Tranås 100.

**Klubo Mil:** Ĵus ekfunkciis. Donacoj bonvenaj.

**Nova**

**Pasporta Servo!**

**Nun haveblas la  
adreso aktuala por  
1991-92!**

**Prezo 60 SEK.**

**Mendu de Esperanto-  
Centro**

## La Espero

### Organ för Svenska Esperantoförbundet

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

**Redaktör:** Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Sättning:** Leif Nordenstorm, Per Aarne Fritzson

**Utformning:** Omnibus, Tyresö

**Tryck:** BodoniTryck AB, Stockholm 1991

**Prenumeration:** 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## Esperantoförbundet

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

**Öppettider:** Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11 - 13 och 17.30 - 19.

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 1991:** Direktansluten medlem 125 kr.

Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 50 kr.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

## SEFs styrelse

**Ordförande:** Roland Lindblom, Esperanto-Centro, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

**Vice ordförande:** Kaisa Hansen, Esperanto-Centro, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

**Sekreterare:** Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91

**Kassör:** Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-122 05

**Styrelseledamot:** Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491-204 61

**Styrelseledamot:** Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52

**Styrelseledamot:** Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-17 36 87

**Suppleant:** Per Aarne Fritzson, Västertorpsvägen 154, 126 59 Hägersten, tel. 08-97 47 76

**Suppleant:** Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

## Esperantoförlaget

**Postadress:** Box 7502, 200 42 Malmö

**Besöksadress:** Möllevångsgatan 20B, Malmö

**Telefon:** 040-12 20 29

**Postgiro:** 578-5

**Telefontid:** 1 september - 15 maj; torsdagar 17 - 18.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Expedition:** Wivi Nilsson

**Styrelsens ordförande:** Tomas Jansson, Storgatan 13, 753 31 Uppsala

## Enhavo

- 34 Anoncetoj
- 35 Enhavo
- 35 Prezidanto
- 35 Redaktanto
- 36 Varioplenaj kongrestagoj
- 38 Ora duopo eksigis
- 39 Nia lingvo: Ĉu "redaktantistulo"?
- 40 Niaj aktivuloj: Ingemar Nordin
- 41 Esperanto en radio
- 42 Por komencantoj: Kiel mi fariĝis esperantisto
- 42 Krucvortenigmo
- 43 Temo: Interurba pruntado
- 44 "Klubo Mil"
- 44 Granda heredaĵo
- 44 Radio-amatoroj
- 45 Vortaro venos en septembro
- 45 Tidningsträffar på EC
- 45 Falköping gaje jubileis
- 45 Nova klubo
- 45 Delegacio vizitis edukministron
- 45 Mono alvenis al Hindio
- 45 Kunlaboro kun Litovio
- 45 UK en Vieno – ne en Prago
- 45 Esperanto en universitato
- 46 Esperanto-muzika studio en Stokholmo!
- 47 Tri krimromanoj
- 47 Pecoj da vivo
- 47 Parolhelpo kaj legohelpo
- 48 Por specialisto kaj amatoro
- 48 SEJU: Barnens Ö en aŭgustol

## (Eksa) Prezidanto

### Karaj membroj

Mi elkore dankas vin ĉiuj por bona kunlaboro dum miaj jaroj kiel prezidanto. Estis laborplenaj, intensaj jaroj kun multaj interesaj kontaktoj en kaj ekster la esperantomovado.

Mi deziras ke ni atingus pli multajn de niaj starigitaj celoj. Ofte mi miras kial homoj ne komprenas la avantaĝojn de esperanto en la inter-

naciaj komunikadoj!

Tamen ni antaŭeniras – eble ne kun grandaj paŝoj sed konstante kaj stabile.

Mi deziras al la nova estraro kaj al vi ĉiuj bonan sukceson kaj baldaŭan venkon.

**Karin Lindquist**  
eksprezidanto

## Redaktanto

Mi nun redaktis La Esperon dum du jaroj. Mi volas danki multajn legantojn pro leteroj, artikoloj kaj noticoj. Nur pro via kunlaboremo mi ĉiam sukcesas kunmeti revuon. Samtempe mi ĉiam bedaŭrinde devas malakcepti kelkajn artikolojn, kaj mallongigi aliajn, simple pro manko da spaco.

Tre bedaŭrinde estas ke la aprila numero de La Espero venis al la legantoj nur en la komenciĝo de junio. La kialo simple estas ke multaj homoj laboras pri La Espero en sia libertempo. Se okazas iu problemo ĉe nur unu el ni, la tuta procezo haltas. Mi nur povas promesi ke ni faros nian plejbonon por eviti similajn malfruigojn estontece.

La dua numero de La Espero en ĉiu jaro estas informnumero. Ĝi enhavas multe da materialo en la sveda, por ke ĝi povu esti uzata kiel propagandilo. Ĝi tamen enhavu ankaŭ interesajn por esperantistoj. Cetere ĝi ĉiam estas pli lukse presita ol ordinara La Espero. Kion vi opinias pri la pasintjaraj informnume-

roj? Ĉu vi uzis ilin por informi pri esperanto? Ĉu ni ankaŭ estonte eldonu informnumeron?

Praktika uzado de esperanto estos ĉiam pli grava por la disvastigo de nia lingvo. En tiu ĉi La Espero aperas artikolo pri Litova Esperanto-Asocio, kiu klopodas krei kontaktojn inter komercaj entreprenoj en Litovio kaj okcidento per esperanto. Se vi iel povas respondi al la peto, ne hezitu. Tiamaniere vi forte subtenos esperanton.

Mi persone dum du jaroj estis tre izolita en la esperanto-movado. Pro miaj du filetoj mi ne povis vojaĝi kaj partopreni esperanto-kongresojn kiel antaŭe. Ĉi-jare mi povos viziti nek UK-n, nek IJK-n. Por mi legado estas gravega por mia kontakto kun la esperantistaro. Mi ankaŭ komencis regule aŭskulti esperantajn radio-programojn. Tion mi povas forte rekomendi al ĉiuj, sed pri tio mi skribos pli multe en venonta La Espero.

**Leif Nordenstorm**  
redaktanto de La Espero

# Varioplenaj, komputilaj oknaciaj kongrestagoj

Trankvila sed gaja, tre bone organizita kaj vere internacia estis la 85-a jarkongreso de SEF en Gotenburgo.

La kongresejo, Hotelo Opalen, estis eble la plej luksa kiun ni iam havis – ĝi superis eĉ la parlamentan domon en 1987! Kiam la SEF-kasisto vidis la vicajn de belaj kongresalonoj lia hararo ekstaris, sed la LKK-kasisto Margareta Hörke informis ke la lukosto estis tre favore rabatita...

La internaciecon de la kongreso montras la fakto, ke partoprenantoj venis el ok landoj: Svedio, Finnlando, Danio, Anglio, Bulgario, Sovetio, Ĉinio kaj Nov-Zelando. Eble la plej internacia SEF-kongreso post tiu en Skövde en 1966, kun ĝia verŝajne neatingebla rekordo de 14 landoj.

Nov-Zelando – per tiu antipoda lando ni kompreneble celas aludi al Mark Fettes, redaktoro de la oficiala UEA-revuo *Esperanto*. Junece simpatia li fariĝis favorato de multaj kongresanoj. Krome – kaj pli grave – li faris du interesajn prelegojn.

Sed la svedaj esperantistoj ne venis tiel multnombro kiel kutime. Finfine la partoprenantaro atingis

ekzakte la ciferon 100. Oni rimarkas kiel batas la terura altiĝo de vojaĝ- kaj hotelkostoj.

## Nova prezidanto

Per tiu ĉi kongreso finiĝis ses-jara epoko en SEF, la "epoko Karin Lindquist". Ŝi nome petis pri eksiĝo de sur la prezidanta posteno.

Nova SEF-prezidanto fariĝis Roland Lindblom, kiu do fakte rehavas la prezidantecon, kiun li forlasis antaŭ ses jaroj, kiam li estis elektita membro de la UEA-estraro.

Ankaŭ la vic-prezidanto, Märtha Andréasson, petis pri liberigo. Nova en la estraro post ŝi estas Kaisa Hansen, la energia kaj ideoriĉa Esperanto-motora el Upplands Väsby.

Sed komencu do de la komenco.

La interkona vespero okazis en la signo de komputiloj: Per Edler kaj Sven-Erik Stjernman prezentis la tradukprogramojn por IBM-komputiloj de sia entrepreno Tramond, la komputila grupo el Västerås prezentis i.a. sian programon por vortstudado, "Glosnost", (ankaŭ ĝi por IBM-kongruaj komputiloj), Bertil Wennergren el Stokholmo demonstris kiel diversaj komputilaj laboroj

en Esperanto estas fareblaj per la komputiloj de la marko Atari ST, dum Per Aarne Fritzson el Stokholmo montris kiel oni kreas Esperanto-literojn por profesia kompostado per Macintosh-komputiloj (uzataj i.a. por la kompostado de *La Espero*). Per Edler poste estis eĉ intervjuita en la regiona televida programo *Västnytt*.

La "interkonuloj" do krom renkonti novajn kaj malnovajn amikojn povis dum la tuta vespero ankaŭ konatiĝi kun la diversaj komputiloj. Do estis utila vespero en trankvila, amika atmosfero.

## Bela sovetia kontribuo

Multaj kongresanoj volis precipe paroli kun la ĉina kaj sovetaj gastoj. Yuejin Guo el Tientsin venis kune kun sia edzino Puff Östling el Örebro. Ili renkontiĝis dum la UK en Pekino kaj fariĝis "duopo".

Oksana Kurpekova el Lvovo kaj Vladimir Soroka el Poltavo ĝuste nun restas en Stokholmo kaj kaptis la okazon viziti la svedan kongreson. Estis tre favore por la kongreso, ĉar ili kolorigis la tagojn per belaj kantoj kaj muziko.

Ni povas imagi, ke 17-jara Fredrik Olofsson el Trollhättan kun iom da hezito miksiĝis inter la aliaj kongresanoj. Li nome lernis Esperanton tute sola pasintjare, kaj antaŭ la alveno al Gotenburgo ankorau neniam parolis kun alia esperantisto. Sed kompreneble la tutaj funkciis. Dum la hotela matenmanĝo ni vidis lin vigle konversacii kun Mark Fettes.

## Orienta dancado

La enhavoriĉa interkona vespero havis ankaŭ aliajn erojn post la bonvensaluto de Ralf Jalming, prezidanto de la LKK komune konsistigita de la gotenburgaj kluboj Societo kaj Interservo.

Märtha Andréasson prezentis la kongresurbon, kaj Suzan Bozoviz el




Bertil Wennergren montris esperantigitan Atari-komputilon. (Fotis U Luin)



la studasocio Medborgarskolan fajre prezentis orientajn dancojn en orienta vestaĵo – aŭ pli korekte sen-vestaĵo. Bela surprizo por ĉiuj, eventuale escepte de s-roj Fritzon kaj Ribers, kiuj frue parkis sin tre strategie...

Por la unua vespero estis planita ankaŭ vizito al la amuzejo Liseberg.



Stefan Carlsson (bildo) kaj Åke Edin el Västerås kune verkis la vortinstruan programon "Glosnost". (Fotis U Luin)

sed pro la malagrabra vetero neniu volis. La tre interesa urboprojmeno en la kvartaloj Haga kaj Masthugget kun profesia cicerono allogis nur ses partoprenantojn. Kulpis verŝajne ne tiom la vetero kiel la konkurenco de la komputiloj.

### Mondkongreso en Tampere?

ILEI, SEJU kaj Eldona havis sabatmatene siajn jarkunvenojn, pri kiuj ili espereble mem raportas.

Dum la solena malfermo la urbo estis reprezentata de la konsilantara vicprezidanto Bengt Mollstedt, kiu ankaŭ invitis ĉiujn kongresanojn al regalita lunĉo. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj por la gotenburga sekcio de la Internacia Virina Asocio kaj por la asocio Estonteco en niaj manoj. La prezidantoj de la dana kaj finna Esperanto-asocioj Tove Bak kaj Jukka Laaksonen salutparolis. Interesa sciigo estis, ke la finna urbo Tampere (Tammerfors) kandidatiĝis gastigi la mondkongreson post kvar jaroj, en 1995.

Estis skribaj salutoj el Bulgario kaj de Ingemund Bengtsson, kiu pro malsano de sia edzino ne povis ĉeesti. Ankaŭ la norvegaj esperantistoj (tre okupitaj pro la okazonta UK en Bergen) skribe salutis.

### Brilaj prelegoj de Fettes

La jarkunvenon de SEF ni pritraktas

en aparta artikolo. Post la kunveno sekvis la unua prelego de Mark Fettes, kiu temis pri eŭropa lingvopolitiko kaj pri la situacio de Esperanto en monda skalo el UEA-perspektivo. Li substrekis, ke la eŭropaj politikistoj nur sukcesis "frostigi" la lingvan problemon. Samtempe Esperanto evoluas i.a. per multaj novaj terminaroj kaj aplikiĝo en multaj novaj medioj, de komputilaj ĝis rokmuzikaj.

La spaco ne permesas nin vaste raportiri pri la du Fettes-prelegoj, sed ni esperas, ke li en sia propra revuo povos redoni al ni la plej gravajn partojn. En la dua prelego dimanĉe li pritraktis la cirkonstancojn inter Unesko kaj la Esperantomovado. Vigle, eĉ streĉe, li rakontis la preskaŭ heroan historion pri la Lapenna-batalo dum la Unesko-konferenco en Montevideo en 1954, kiu antaŭis la akceptigon de UEA kiel konsila instanco al Unesko.

### Diservo en bela preĝejo

La dimanĉo laŭtradicie komenciĝis

per diservo. Ĝi okazis en la bela Norvega marista preĝejo vid-al-vide de la kongresejo.

"Atestanto" – laŭ sia propra propono – estis Harry Persson. Sed tiu "atesto" estis tiel bona prediko, ke tiu vorto pli pravas. Bele kantis Ingegerd Forssén al muziko de Helena Morath.

Britta Rehm, kiun KELI komisiis por la aranĝo, povis noti bonan kolektaĵon, 701 kronojn.

Torsten Lund el Malmö nun dum multaj kongresoj ĝojigis la aŭkcian partoprenantojn per sia gajhumora gvidado. Same okazis denove – eble la rideblecoj ĉi-foje estis rekordaj. Tiu ĉi libro-aŭkcio donis al SEF 2.174 kronojn.

Alia granda kontribuo estis de Aino Åberg, kiu loterie vendis pramane kudritan tukon. La rezulto estis 2.000 kronoj.

Dum la tuta kongreso Kaisa kaj Ole Hansen vendis librojn, kaj la rezulto estis proksimume 2.500 kronoj.

Per venditaj 500 lotoj Lennart Svensson lanĉis la ĉi-jaran Esperanto-loterion.

### Laŭdita LKK

Venis la fino ankaŭ por la gotenburga kongreso. Alvokita al la podio estis la tuta LKK: Rolf Jalming, Märtha Andréasson, Margareta Hörke, Inga Johansson, Christer Lörnermark, Kent Grahn, Karl-Erik Pettersson kaj Aira Kankkunen. Ili estis laŭditaj por tre bona laboro.

Finfine la kongresa tasko estis transdonita al la reprezentanto de la venonta kongresa urbo Oskarshamn, Birgita Edwall.

Fakte restis ankoraŭ unu kongresa ero. Deko da bravuloj spitis la pluvon kaj blovon, partprenante ekskurson per la boato *Paddan* en la kanaloj kaj la haveno de Gotenburgo. Ili poste preskaŭ bezonis la hotelan saŭnon por rehavi la varmon...

Sed des pli varma ja estis la kongresa etoso

**Börje Andersson**

La kovrilaj fotoj montras (supre) Karin Lindquist transdonanta la prezidantaĵon al Roland Lindeblom kaj (malsupre) ĉeestantojn de la SEF-kongreso en Gotenburgo. (Fotis U Luin)

# Ora duopo eksiĝis – Roland estro fariĝis

"Nova prezidantaro" de SEF, agadplano kiu antaŭvidas novajn klopodojn enpentrante lernejojn kaj amaskomunikilojn, premioj al kvar kluboj pro membrovarbado, altiĝo de jarkotizoj per 10 kronoj – jen kelkaj eroj de la SEF-jarkunveno dum la gotenburga kongreso.

Glate iris la pritraktado. Plejan dankon pro tio meritas la kunvenprezidanto Sten Svenonius el Malmö. Ni, kiuj vidis lin zorge prepari sin por la tasko, ne miras. Ĉe sia flanko li havis Gertrud Lund, ankaŭ el Malmö, kiel protokoliston.

Laŭ la estrara raporto la membronombro fine de 1990 estis 1268. Senpaga laboro de Ulla Luin, Kaisa kaj Ole Hansen, Ingemar Nordin kaj aliaj malaltigis la kostojn por Esperanto-Centro, same kiel ankaŭ senpaga laboro de Leif Nordenstorm, Franko Luin, Per Aarne Fritzön, Milorad Ljubisaljovic kaj grupo de stokholmaj esperantistoj malaltigis la kostojn por La Espero.

La enspezoj de SEF estis dum 1990 multe pli grandaj ol la elspezoj. Tial 60.000 kronoj estas deponitaj en reserva fonduso. Tamen restis 4.103 kronoj por altigi la sumon de propra kapitalo je 171.814 kronoj.

Al la bona ekonomia stato helpis precipe la rekordaj sumoj de testamentaj kaj aliaj donacoj (92.542 kronoj) kaj la grandega loteria laboro de Lennart Svensson en Filipstad (gajno 42.417 kronoj). Sed venos nun grandaj elspezoj, i.a. la centmilkrona jara lukosto de Esperanto-Centro.

## "Ora duopo"

Roland Linblom fariĝis nova prezidanto kaj Kaisa Hansen nova vicprezidanto post la rezignoj de Karin Lindquist kaj Märtha Andréasson. La ceteraj estraranoj restas, kiel ankaŭ la revizoroj Bertil Bengtsson kaj Åke Blomberg.

– Mi pensas pri la librotitolo "La

ora duopo", kiam mi rigardas la bonan laboron, kiun dum tiel multaj jaroj faris Karin Lindquist kaj Märtha Andréasson, diris ilia estrarkolego Bertil Andréasson kaj transdonis al ili de SEF valorajn librojn, eĉ "trezorajn".



*La kongresan libroservon prizorgis Kaisa kaj Ole Hansen el Upplands Väsby. Kaisa krome elektiĝis vicprezidanto de SEF. (Fotis U Luin)*

## Nova jarkotizo

Dum du jaroj la membrotizoj restis la samaj. Por defendi sin kontraŭ la inflacio la estraro nun proponis altiĝon je 10 kronoj por ĉiuj kategorioj. La jarkunveno jesis la proponon.

Tio signifas la jenajn novajn kotizojn por 1992: Individuaj membroj senklubaj 135 kronoj, klubaj 110 kronoj, senklubaj familiaj kaj junulaj membroj malpli ol 21-jaraj 60 kronoj, la samaj en kluboj 45 kronoj.

## Rabatita librovendado?

La klubo en Skövde proponis kelkajn rabatojn kiam libroaĉetantoj mem transportas la librojn el Esperanto-Centro kaj kiam oni aĉetas multajn librojn samtempe. Tamen,

en Esperanto-Centro tia rabatsistemo estus tro malfacila administri. Tial la estraro ne volis aprobi la proponon de Skövde, kaj la jarkunveno sekvis tiun konsilon.

Lennart Svensson en Filipstad proponis, ke partoprenantoj de oksemajnaj kursoj en Karlskoga aŭtomate kaj senkoste fariĝu membroj en SEF dum la unua jaro. Bona ideo, opiniis la SEF-estraro, sed necesas unue demandi, ĉu la kursano vere volas fariĝi membro. La jarkunveno konsentis.

Malgranda aldono al la SEF-statuto estis unuanime akceptita. Temis pri paragrafo 2, "Celoj", por ke SEF estu en pli bona situacio dum imposta traktado de testamentoj.

## Varba konkurso

Dum 1990 SEF aranĝis konkurson pri membrovarbado. Venkis la klubo en Lund kun 12 novaj membroj kaj ricevis 1000 kronojn. Dua estis Interservo en Gotenburgo kun kvin novaj membroj kaj ricevis 500 kronojn.

La tria loko estis dividita inter la gotenburga Esperanto-Societo kaj la klubo en Kungälv, kiuj ricevis po 125 kronojn.

La intereso por la konkurso ne estis tiel granda ke ĝis nun estis decido pri nova konkurso.

## Laŭdita turneo

Aprobata agadplano por 1991–92 antaŭvidas en- kaj elspezojn por 326.000 kronoj.

Sur la kampo de edukado estos klopodoj ne nur en Karlskoga, sed ankaŭ ĉe ŝtataj instancoj, studorganizaĵoj ktp. Dank' al establita bona kontakto kun la ĉefo de la edukradio estas daŭre eble esperi pri informprogramo en la radio.

Du turneoj estis planitaj por 1991: Erich-Dieter Krause el Leipzig jam faris sian, treege laŭditan, turneon kaj aŭtune sekvos Irina Gončarova el Moskvo.

Sur la informada kampo oni notis, ke la faldfolio *Esperanto är...* elĉerpiĝis, sed venos nova stoko. Venos ankaŭ serio de diapozitivaj kaj manlibroj por la kluboj.

**Börje Andersson**

# Ĉu "redaktantistulo"? (Ne.)

Leganto demandis pri la ĝusta uzo de la sufiksoj **-ist-** kaj **-an-**, pri vortoj kiel "stalinisto, stalinano", ktp.

Esperanto disponas pri pluraj vortfariloj por krei vortojn por homoj. Ni havas **-ul-**, **-ist-**, **-an-**, **-ant-**, **-int-**, **-ont-**, **-at-**, **-it-** kaj **-ot-**. Ĉiu havas sian sencon, kaj oni ĝenerale povas facile trovi la ĝustan.

Vortoj finiĝantaj per **-ul-** indikas homon, kiu estas karakterizata de tio kio venas antaŭ **-ul-**:

**Belulo** – homo, kies plej karakteriza eco estas belo

**Drinkulo** – homo, kiu estas karakterizata de sia drinkado

**Pensulo** – homo, kiu regule ricevas pension

**Unuokululo** – homo, distingata de tio, ke li havas nur unu okulon

**Dekstramanulo** – homo, kiu uzas ĉefe sian dekstran manon

Oni vidas, ke en la vortoj kaŝiĝas neesprimataj eroj. Drinkulo estas "sia-propra-drinkado"-ulo; unuokululo estas "havas-nur-unu-okulon"-ulo; ktp. La vortoj estas densigitaj ideoj. Oni ofte parolas pri la principo de neceso kaj sufiĉo. Oni konservu en tia vorto nur la necesajn partojn, sed oni ne koncizigu la vorton tiel, ke ĝi fariĝas nekomprenebla. Ĉio laŭ ĝusta mezuro. (Jen cetere ebla traduko de la sveda "lagom", kiun multaj kredas netradukebla!)

Vortoj kun **-an-** indikas homon, kiu subtenas iun ideon, membras en iu grupo, loĝas en iu loko ktp. Temas do pri plursenca sufikso:

**Kristano** – ano de Kristo, de la religio de Kristo.

**Budhano** – ano de Budho, de la ideoj de Budho.

**Stalinano** – homo, kiu subtenas Stalinon.

**Respublikano** – subtenanto de la ideo, ke ŝtato estu respubliko; aŭ ano de iu partio, kiu nomas sin respubliko.

**Svediano** – loĝanto de Svedio.

La senco de **an-**vorto tre dependas de la senco de la radiko.

Vortoj kun **-ist-** indikas iun homon, kiu multe okupiĝas pri tio, kio venas antaŭ **-ist-**. La sufikso do ofte indikas profesiulon, sed tute ne ĉiam. Estas tro ofta miskompreno, ke **-ist-** signifus "profesiulo". Ĝia baza senco estas nur "iu, kiu ofte okupiĝas pri io":

**Esperantisto** – homo, kiu scias kaj uzadas la Internacian Lingvon.

**Dentisto** – homo, kiu ofte okupiĝas pri dentoj; sed fakte la senco estas ĝuste dentokuracisto, kio denove montras, ke povas troviĝi en vorto kaŝitaj elementoj.

**Ŝtelisto** – homo, kiu ofte/kutime ŝtelas.

**Alkoholisto** – homo, kiu estas dependa de alkoholo.

La sufikso **-ist-** havas ankaŭ specialan uzon, en kiu ĝi signifas **-ism-an-**, do subtenanto de iu "ismo". Oni uzas **-ist-** kiel mallongigon de **-ismano**:

**Marksisto** = **Marksismo** – subtenanto de marksismo (la ismo, la doktrinoj de Markso).

**Stalinisto** = **Stalinismo** – subtenanto de stalinismo (la ideoj de Stalino).

Tamen **kapitalisto** ne estas kapitalismo, sed posedanto de (multa) kapitalo. Ne ĉiam **-ist-** estas mallongigo de **-isman-**.

Oni vidas, ke **-an-** kaj **-ist-** povas okaze fariĝi tre proksimaj unu al la alia, kaj tiam oni havas la eblon uzi iun ajn el ili. Oni kutimas uzi tiun, kiu kreas la plej internacian rezulton.

Oni diras normale **kristano** (kaj ne krististo aŭ kristismo) pro naciaj vortoj kiel "christian", "kristen", ktp. Oni preferas **budhismo** (anstataŭ budhano) pro naciaj similaĵoj. (Kaj oni diras **budhismo**, la ismo de Budho mem, sed **kristanismo** – la ismo ne de Kristo sed de la kristanoj! – kio estas fascina malsimetrio kaŭzita de naciaj vortoj kiel "buddhism", "christianity", ktp.)

Ĉiuj tiuj vortoj estas do tute loĝikaj, sed foje nesimetria inter si.

Tamen ĉiu havas la rajton uzi simetriajn esprimojn. La sufiksoj **-an-**, **-ist-** kaj **-ism-** donas multajn eblojn de variado kaj nuancado.

Mi menciis ankaŭ, ke ekzistas multaj vortoj, kiuj ne estas kunmetitaj kun la sufikso **-ism-**, sed kiuj tamen finiĝas per **...ism-**. Normale ekzistas **ist-**a parolo por ĉiu tia **ism-**vorto, kiu signifas **...ismano** aŭ **...ismisto** (**faŝismo** – **faŝisto**; **turismo** – **turisto**; **monoteismo** – **monoteisto**; k.s., por kiuj *ne ekzistas* iuj radikoj "faŝ-", "tur-" aŭ "monote-").

Fine ekzistas la participaj sufiksoj **-ant-**, **-int-** kaj **-ont-**. Ili signifas (kun o-finaĵo) "homo, kiu faras/faris/faros agon indikitan de la radiko". Estas do klara diferenco inter **...isto** kaj **...anto**. La isto okupiĝas pri io kutime (eventuale profesie) dum la anto faras ion ĝuste tiam (eble por la unua kaj lasta fojo). Ekz. **redaktisto** profesie/kutime redaktas, dum **redaktanto** redaktas nun. Ofte ekzistas aparta radiko, kiu estas neŭtrala inter isto kaj anto: **Redaktoro** estas aŭ redaktisto aŭ redaktanto. Tial multaj preferas uzi la vorton redaktoro, ĉar ĝi estas pli fleksebla en sia senco. Tamen ĝi estas kroma radiko, kiun oni devas aparte lerni.

La demandinto ankaŭ demandis kiel nomi profesion redaktoron, se oni volas diri ĝuste kaj klare, ke li estas profesiulo. Mi proponas, ke oni diru ĝuste "profesia redaktisto" (aŭ "profesia redaktoro"). Ne ĉiam devas ekzisti unuvortaĵo. Duvortaĵo (aŭ eĉ plurvortaĵo) estas ofte la plej klara kaj bona solvo.

Alia interesa temo estas, ĉu la **an-**, **ul-**, **ist-** kaj **ant-**vortoj indikas homojn aŭ virojn? Ĉu necesas aldoni **-in-** kiam temas pri virino? Al tiu demando mi esperas reveni alian fojon.



# Ingemar Nordin: Esperantist och Freinet-pedagog

Det var efter att han gått i pension som Ingemar Nordin blev aktiv i vår rörelse. 1979 flyttade han till Stockholm och klargjorde för Ulla Luin att nu ville han jobba för esperanto! Ingemar kände att han ville "betala igen" för allt vad han fått vara med om genom esperanto.

Ingemar Nordin var ordförande för Stockholms esperantoklubb och han gjorde även andra viktiga insatser under 80-talet. Vi ska återkomma till detta, låt oss ta det hela från början.

### I all korthet

Ingemar Nordin föddes 1914 i Ransäter, Värmland. Yrkesmässigt fick han – under arbetslöshetens 30-tal – börja som folkskollärare. Inom det svenska skolväsendet skulle han sedan vara verksam under hela sitt yrkesliv.

Sin första kontakt med esperanto fick Ingemar 1929, genom ett föredrag av rumänen Tiberiu Morariu. Han genomgick då en grundkurs, men det dröjde till 40-talet innan han började använda språket, då främst genom korrespondens.

Ingemars första UEA-kongress var den i Malmö 1948. Annars dröjde det tills in på 70-talet innan han fick träning i att tala esperanto i större omfattning. Det skedde genom engagemang inom den internationella esperanto-organisationen för lärare. Och då har vi kommit fram till detta som Ingemar ville "betala igen".

Tack vare esperanto kunde Inge-

mar komma i kontakt med Freinet-lärare i Frankrike, lärare som själva talade esperanto. 1975 gjorde han en rundresa i Frankrike, kunde besöka ett antal Freinet-skolor och studera denna pedagogik. Detta gav Ingemar så att säga en "kick", eftersom det stämde med hans egna yrkeserfarenheter.

–Vad är kärnidén hos Freinet-pedagogiken?

–Det är att ungar är som vuxna. De vill jobba, men det ska vara meningsfullt, de ska själva kunna påverka.

Här behövs, menar Ingemar, "ingen piska". Ungarna ropar inte "Hurral!" när en lektion är slut.

En av förklaringarna till detta är också att lärostoffet kommer i lagom portioner, allt blir överskådligt.

–Man ska inte gapa över mer än vad som i varje skede är nödvändigt. Det gäller att bygga upp ett självförtroende och en aptit på kunskaper. Det ska vara roligt att lära sig!

### Brevkurs

Dessa Freinet-idéer har Ingemar på 80-talet tillämpat också inom vår rörelse. Han är nämligen författare till brevkursen i esperanto, där han håller sig helt till "det lilla språket":

–I inlärningskedet omfattar den bara 200 ord.

Brev 1 har spridits till allmänheten genom bl. a. biblioteken. I det finns en svarsuppgift att sända in, och likaså till efterföljande brev. Ingemar har alltså tagit på sig ett stort arbete att rätta allt som kommer in.

Brevkursen har blivit en stor succé, det kan man påstå utan att riskera någon överdrift. Genom den har nämligen Esperantoförbundet tillförts ett par hundra nya medlemmar på bara några år.

### EKS-ordförande

Under fem år var Ingemar ordförande i Esperantoklubben i Stockholm. Det var under den tiden som klubben flyttade sina möten från en källarlokal på Södermalm till Brygghuset på Norrmalm.

– Där var fint ordnat för föreningarna, anser Ingemar, och det gav möjligheter för oss att få kontakt med nya intresserade. D.v.s. det gällde då att rätt utnyttja dessa möjligheter.

Vilket EKS under Ingemars ledning också gjorde:

–Esperantorörelsens främsta uppgift måste vara att se till så andra kommer åt språket, får veta att det överhuvudtaget finns! Därför hade vi information uppsatt på affischpelaren i Brygghusentrén. Den vägen nådde vi många.

Föreningen hade hela tiden igång nybörjarkurser enligt ett rullande system. Intresserade kunde hoppa in direkt utan att behöva vänta tills nästa kurs började.

Ingemar arbetade också en hel del med Esperanto-Centro, som hade öppnats på Brunngatan efter UEA-kongressen i Stockholm 1980.

–Det var ju en revolution för oss! Rymliga lokaler, centralt belägna och med stora skyltfönster mot gatan.

Ingemar hade visioner om att det skulle fungera som en samlingspunkt, ett "öppet hus", för stadens esperantister.

### Klubbmötena

En frågeställning har varit i vilken utsträckning mötena skulle ske på esperanto. Det visade sig att språknivån hos många nya inte räckte för att kunna hänga med när det talades esperanto.

–Men klubbmötena är ju enda chansen för många esperantister att använda språket muntligt.

Vad man kan begära, menar Ingemar, är att erfarna esperantister

**NIAJ AKTIVULOJ** är en ny rubrik i *La Espero*. Under den kommer vi att publicera en rad intervjuer med människor som kan och använder esperanto. Ansvarig för rubriken är **Jan Milld**.




tar hänsyn, bemödar sig att prata tydligt. Han ser det också som nödvändigt att årsmöten, där beslut om verksamhetsinriktning ska fattas, sker på modersmålet. Det har ju en demokratisk sida att alla då kan deltaga på lika villkor.

### Behov av material

Nybörjarkurser efter Freinet-metoden är alltså bra för fånga in intresserade, men det är inte nog för att ge tillräcklig språknivå. Ingemar Nordin menar att det skulle behövas också ett bra studiematerial till fortsättningscirklar.

Vad han också kunnat konstatera behovet av är ett bra material på svenska om esperanto – dess historia, m.m. Ständigt har gymnasister hört av sig, men man har inte haft något att sätta i händerna på dem.



När det gäller språknivå ser Ingemar Nordin det hela funktionellt: Det viktiga är att kunna förstå och göra sig förstådd. Däremot får grammatisk perfektionism inte drivas för långt.

Han hyllar också principen om *növändighet och tillräcklighet*. Tillämpad på t. ex. affix betyder den att man inte belastar ett ord med fler sådana än vad som behövs för klarheten.

Ingemar Nordin har tidigare utsetts till hedersmedlem i Svenska Esperantoförbundet. På Stockholmsklubbens årsmöte 1991 utsågs han till hedersmedlem också i EKS.

Däri ligger dock inga förhoppningar om att han ska gå i pension som esperantist. Vår rörelse behöver alla åldersgrupper!

*Jan Milld*

## Esperanto en radio

Programoj aŭskulteblaj en Svedio. La informoj estos validaj ĝis la fino de septembro.

Sveda tempo	Stacio	Frekvenco kHz
00.00-00.30 (Lu)	<b>La Habana</b>	11950; 15220
00.45-01.00 (Lu)	<b>Zagreb</b>	1143
00.55-01.00 (Ve)	<b>Vilnius</b>	666; 6100
01.25-01.30 (Ma)	<b>Vilnius</b>	11790; 13645; 15180; 15455; 15485
03.15-03.30 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	6125; 6135; 9650; 9885; 12035; 17730
05.15-05.30 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	6135; 9650; 9885; 12035
06.05-06.30 (Di)	<b>Wien</b>	6155; 13730; 15410
06.40-06.55 (Ja)	<b>Vaticano</b>	1611; 7365; 15210
09.45-10.00 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	9560; 13685; 17670; 21695
11.20-11.30 (Di)	<b>Tallinn</b>	1035; 5925
12.45-13.00 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	13635; 15570; 17830; 21770
14.30-14.45 (Lu/Ja/Sa)	<b>Bern</b>	3985; 6165; 9535
15.05-15.30 (Di)	<b>Wien</b>	6155; 13730; 15430; 21490
15.15-15.30 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	7480; 11695; 13635; 15570; 17830; 21695
17.15-17.30 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	13685; 15430; 17830; 21630
17.30-17.55 (Ĉiutage)	<b>Warszawa</b>	6095; 11815
19.15-19.30 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	9885; 11955; 15525; 17830; 21770
19.30-19.55 (Ĉiutage)	<b>Warszawa</b>	6135; 7285; 9540
20.30-21.00 (Di)	<b>La Habana</b>	11950; 15220; 15435
21.00-21.10 (Di)	<b>Vaticano</b>	526; 1530; 6248; 7250
22.00-22.30 (Ĉiutage)	<b>Beijing</b>	7405; 7470; 9965
22.00-22.20 (Sa)	<b>Roma</b>	7275; 9710; 11800
23.20-23.30 (Ja)	<b>Tallinn</b>	1035; 5925
23.15-23.25 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	9810; 9885; 12035; 15570
23.30-23.55 (Ĉiutage)	<b>Warszawa</b>	1503; 5995; 6095; 6135; 7270; 7285

Informoj pri ŝanĝiĝoj estas bovenaj al la redaktanto de La Espero.

520-1710 kHz=Mezlongaj ondoj; 2300-2495 kHz=120 m; 3200-3400 kHz=90m; 3900-4000 kHz=75 m; 4750-5060 kHz = 60 m; 5959-6200 kHz=49 m; 7100-7300 kHz=41 m; 9500-9900 kHz=31 m; 11650-12050 kHz=25 m; 13600-13800 kHz=25 m; 15100-15600 kHz=19 m; 17550-17900 kHz=16 m; 21450-21850 kHz=13 m; 25670-26100 kHz= 11 m.

## Por komencantoj

# Kiel mi fariĝis esperantisto

Stranga estas la vojo de la vivo. Aferoj okazas pro tre kuriozaj kaŭzoj. Ekzemple, mi fariĝis esperantisto je supezeble neordinara maniero.

Ĉio komenciĝis antaŭ kvar jaroj. La societo La Gideonoj vizitis mian lernejon. La anoj parolis pri sia societo kaj donis al ĉiu lerneĵano Novan Testamenton. En la libro troviĝis strofo kiu estis tradukita en 33 lingvojn, i.a. Esperanto. Mi jam sciis ke la lingvo ekzistas, sed mi ne sciis ion pri ĝi. Tial mi klopodis legi la strofon. Tiam, antaŭ kvar jaroj, mi studis la francan, kaj ŝuopezeble tial mi komprenis iomete de la strofo. Tio estis mia unua kontakto kun la lingvo, kaj mi interesiĝis, eĉ se post semajno mi forgesis pri ĝi.

La dua kontakto, kaj la decidiga, okazis antaŭ proksimume unu kaj

kvarona jaro. Mi estas skolto, kaj ĉiu skolto ricevas revuon. En unu el la revuoj estis artikolo titolita "Ĉu vi parolas Esperanton?" Mi legis ĝin, kaj tiam mi vere intereseĝiĝis. Mi preskaŭ freneziĝis. Mi rapidis al la biblioteko kie mi mendis lernolibron, ĉar en tiu biblioteko Esperanto-lernolibroj ne troviĝis. Mi ankaŭ skribis al la Sveda Esperanto-federacio, mendante informojn.

Mi ricevis informon de SEF post nur kelkaj tagoj. Estis letero, kiu enhavis korespondkurson pri la internacia lingvo, kiun mi tuj komencis studi. Kaj post tio, la evoluo ratrapide pluiris ĝis kio mi estas nun: freneze konvinkita esperantisto. Ĉio dank' al francstudado, Nova Testamento kaj la skoltomovado, kio montras ke ĉiuj manieroj estas bo-


naj, escepte de la malbonaj.

**Fredrik Olofsson**

Antaŭ kelkaj jaroj mi partoprenis iun esperantan aranĝon, en kiu la partoprenantoj rakontis unu al la aliaj kiel ili fariĝis esperantistoj. Tre interesa fenomeno estis ke ĉiu aŭdis pri esperanto plurfoje antaŭ ol li fariĝis esperantisto. Tial la artikolo de Fredrik Olofsson estas tre instrua al ĉiuj, kiuj propagandas Esperanton. Ĝi montras ke estas tre valore ke esperanto estas menciita en revuoj, en libroj, en radio kaj en televido kiom eble plej ofte, ĉar post kiam kelkaj homoj aŭdis pri esperanto kelkfoje, ili fakte komencas studi ĝin.

**Leif Nordenstorm**

## Krucvortenigmo



### Horizontale:

1. Belan sezonon
2. Retreto – Prefikso
3. Malokupi (radiko) – Malplora
4. Amatoroj
5. Rilata al kemia elemento
6. Scio – Bildkaptl'
7. Grup' – Kriptono
8. Deklinacia kazo
9. Bela ŝtono – Frakci'
10. Monaton – Emfaza adverbo

### Vertikale:

- A. Rilata al parolanto en preĝejo
- B. Kontrollisto
- C. Loĝanton en bela boto – Grandega akv'
- Ĉ. Malgranda nuko – Farigi
- D. Bongusta fiŝo – Pafobru'
- E. Prepozicio – Meĥanismo
- F. Malĝojigan – Muzika son'
- G. Pasiva sufikso – Post du
- Ĝ. Laŭ volo de alia – Irej'
- H. Maljesaj – Reklamgasa

## Interurba pruntado por legemuloj

Ĉu vi ŝatas literaturon sed ne estas riĉulo? Ne gravas. Troviĝas ja biblioteko en ĉiu urbo kaj urbeto. Ĉu vi ŝatus legi librojn ankaŭ en esperanto? Kaj ĉu en via urba biblioteko troviĝas sub la sekcio "Fy: Konstgjorda språk" nur tri ŝimaj libraĉoj el mil-okcent-iam?

Ne malesperu, sed faru kiel mi! En ĉiu komunuma biblioteko de Svedio vi povas mendi inter-urban prunton (*fjärrlån*), de ĉiu libro troviĝanta en alia sveda biblioteko. En la urba biblioteko de Gotenburgo (*Göteborg*), troviĝas pli ol 300 libroj en esperanto, grandparte modernaj. Oni ankaŭ eldonas liston "Böcker på esperanto", kiun vi povas mendi de Göteborgs Stadsbibliotek Facksal 7, tel 031-81 04 80.

Do, iru al via biblioteko, petu pri interurba prunto, kaj por faciligi donu al la bibliotekisto slipon, kie vi notis la aŭtoron kaj titolon de la dezirata libro. Por ĉiu libro vi pagos kvin kronojn. Post kelka tempo vi ricevos avizilon (*avi*), ke la libro alvenis al via biblioteko, kaj vi povos iri tien por pruntepreni ĝin.

Se vi havas similan guston kiel mi, provu ekzemple:

### Tradukitaj romanoj:

Amado, J: *La vivo kaj la morto de Kinkas Akvobleko* (brazila burleskaĵo)

Cela, C J: *La familio de Pascual Duarte* (la plej konata verko de la hispana nobel-premiito)

Kivi, A: *Sep fratoj* (la unua grava finna romano)

Tomizza, F: *Materada* (aŭto-biografiaĵo pri vivo de etna malplimulto en Istrio)

### Originalaj romanoj:

Nemere, I: *Sur kampo granita* (streĉaĵo pri morala dilemo)

Štimec, S: *Ombro sur interna pejzaĝo* (tenere kaj sincere pri virino en malfacila periodo de la vivo)

Tófalvi, E: *Kiuj semas plorante* (historie kaj fantazie pri faŝistoj kaj esperantistoj)

Varankin, V: *Metropoliteno* (vera klasikaĵo, enhance kaj forme interesa, pri amo, politiko kaj metroo)

Supre mi proponas nur romanojn, sed troviĝas ankaŭ poezio, kaj preskaŭ duono de la gotenburga kolekto konsistas en nefikcia (faka) litera-

turo, ekzemple lingvaj traktaĵoj.

Plezuran legadon!

Sten Johansson

## Ankoraŭ iom pri abeloj

En La Espero 1991:1 sub la rubriko **Temo** aperis artikoleto "Kiu havas abelojn, havas mielon..." Malte Markheden afable atentigis pri tio ke abelujo signifas nur *bikupa*. *Bisamhälle* siavice estas abelosocio. Mi citas el lia letero: "Devas esti 'en abelsocio estas tri abelaj kastoj (specoj)...' Kaj ne estas abelujo, kiu produktas mielon, sed la abelsocio. Eble ekzistas en Svedio 90 000 abelsocioj, sed multe pli da abelujoj. Ankaŭ estas pli ĝuste skribi, ke la reĝino konservas ol gardas la spermajn (spermatozoojn). Krome la pupoj ne kreskas, sed la larvoj tion faras."

Dankon al Malte Markheden pro liaj korektoj. Mi samtempe invitas lin kaj ĉiujn aliajn skribi pri siaj specialaĵoj por **Temo**. Unu A4-paĝo estas sufiĉe.

Leif Nordenstorm

Solvo de la enigmo en La Espero 2/1991:

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H	Ĥ	I	J	K
1	S	T	O	K	H	O	L	M	O		S	T	R	I
2	K	A	T	O		K	I	A	L	O		R	E	N
3	A	P	E	R	A	S		N	E	R	V	A		A
4	N	I	L	O		I	N	K	O		O	F	E	R
5	D	R	O	N	I	G	O		N	U	L	I	G	O
6	I				A	R	E	S		R	A	K	O	N
7	N	E	A		E	N	T	E	N	A	S		I	A
8	A	L	K	A	N		A	M	E	L		E	S	A
9	V	E	T	E		P	L	A	G	O	R	O	M	P
10	I	K	A	R	O		G	R	U		E	S		A
11	O	T		U		D	I		S	E	K	T	O	R
12		A	R	M	E	O		O	L	A	O	S	A	J
13		N	E	I	S		A	R	D	O	N		A	T
14	A	T	E	N	T	A	N	T	O		T	E	K	O
15	M	O	N	T	O		T	A	M	P	O	N	O	J

## ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

### Volomo 2: E-J

Jes, jus aperis la dua volomo de tiu ĉi grava verko de Ebbe Vilborg. Nepra por ĉiu lingve interesata esperantisto.

Prezo: 95 SEK

Mendu ĝin ĉe:

Esperantoförlaget, Box 7502, 200 42 Malmö

## Tra la lando

### "Klubo Mil" por fortigi SEF- kason!

Dum deko da jaroj "Klubo Cent" donis belajn sumojn al SEF. Tiamaniere membroj, kiuj volis pagis 100 kronojn pli ol la ordinara jarkotizo, fortigis nian ekonomion.

Sed samtempe, pro la inflacio, la 100 kronoj fariĝis ne tiom valoraj kiel antaŭe. La SEF-estraro tial decidis fondi novan "Klubo Mil" por membroj, kiuj volas donaci 1000 kronojn jare. Fakte jam nun okazas tiaj donacoj, raportitaj sub la rubriko "Donacoj".

La intenco estas, ke la donacoj al "Klubo Mil" estu numerigitaj kaj dum la tuta jaro prezentitaj en *La Espero*. Kaj ni celas ne nur individuajn membrojn, sed ankaŭ klubojn kaj organizojn. Do ek al la SEF-poŝtĝiro 20 12-3, kaj skribu "Klubo Mil" sur la pagilo.

Fariĝu membro de vere ora klubo! Ni bezonas la monon precipe por Esperanto-Centro, kies jara lukosto nun jam superas 100.000 kronojn...

### Granda heredaĵo al SEF

Kiam la testamento de Agda Olsson, Gotenburgo, estis malfermita, montriĝis, ke ŝi decidis doni al SEF tre grandan heredaĵon: Post forpreno de la imposto (45.720 kronoj) restas al SEF 143.023 kronoj.

Tiu verŝajne estas unu el la plej grandaj donacoj, kiujn SEF iam ricevis. Laŭ la deziro de Agda Olsson la tuta sumo estu uzota "por edukado".

Agda Olsson mortis en julio pasintjare, en la aĝo de 92 jaroj. Dum ŝiaj aktivaj jaroj ŝi estis tre konata esperantisto – ankaŭ ekster Svedio.

En dankletero al ŝiaj parencoj SEF esprimis sian grandan dankemon kaj varmajn pensojn, kiuj ĉiam estos ligitaj al la nomo Agda Olsson – ne nur pro la heredaĵo, sed ankaŭ pro ŝia agado por Esperanto dum ŝia vivodaŭro.

### Radio- amatoroj

Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj estas mond vasta organizo por radiamatoroj, kiuj volas uzi la internacian lingvon por amatorradiaj kontaktoj.

Je ĉiu UEA-kongreso ILERA klopodas starigi stacion, kaj ĉi-jare la nordia sekcio de ILERA ricevis la demandon, ĉu eblas starigi bone funkciantan stacion en Bergen.

Parte pro tio kelkaj membroj de la nordia sekcio de ILERA kolektiĝis en la sveda urbo Västerås, al kies radio-klubo jam kvin el la ILERA-membroj apartenas. Tie oni informiĝis, ke la Bergen-grupo de la norvega radiamatora ligo prenos sur sin la respondecon pri la stacio, kiu verŝajne havos la voksignon LA1-ESP. Tiu informo estis bonvenige akceptita!

Certe troviĝis multaj komunaj demandoj pridiskutindaj, sed ĉiuj alte taksis la eblecon ne nur per radio sed persone kontaktiĝi unu kun la aliaj. Kvankam estis ebleco uzi la unuarangan radistacion de VRK, oni ne trovis multe da tempo por radikomunikado! La pli kaj pli populara sendtekniko "pakajradio" estis demonstrita de SM5CS.

Sur la bildo, kolektitaj antaŭ la kurtonda stacio de la radio-klubo de Västerås, estas de maldekstre (malantaŭe) LA1MG Arnold Selnes, SM3IIG Börje Blom, LA9AEA Jon Arne Holm, SM5CS Stig Strandberg, LA5KD Björn Thuv, SM5DAD Kaj Stridell, (antaŭe) SM4RG Göran Östling, LA5RQ Marco Bau, SM5IFT Alvar Johansson kaj SM4-7532 Inger Lannergård.

La nordia sekcio de ILERA nun havas membrojn en Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Islando. Mankas ankoraŭ la danoj! Ĉiuj danaj esperantistaj radiamatoroj estas kore invititaj aliĝi al la nordia sekcio de ILERA! La peranto estas:

**SM5DAD Kaj Stridell,  
Rotevägen 1,  
S-735 33 Surahammar,  
Svedio,**

per pakajradio ankaŭ atingebla pere de **SK5BB** aŭ **SK5SU**.

*Kaj Stridell*

*Partoprenantoj de la ILERA-kunveno en Västerås*





## Vortaro venos en septembro

La nova sved-esperanta vortaro de nove malfruigis, sed devas veni en septembro. La kaŭzo estas ke la korrektistoj tiel zorge laboris, ke multaj ŝanĝoj sekvis.

Pri tio informiĝis la jarkunveno de la Eldona Societo en Gotenburgo. Krome la kasisto Lennart Lagergrantz raportis, ke anstataŭ la atenditaj 300 antaŭmendoj venis nur 187. Sed eblas daŭre antaŭmendi ĝin laŭ la malaltigita prezo de 320 kronoj.

Alia tasko estas nun reaperigi la unuan parton de *Jen nia mondo*.

La sola ŝanĝo en la estraro estis, ke Per Aarne Fritzson eniris anstataŭ Åke Blomberg.

## Tidningsträffar på EC

I det senaste numret av *EKSpreso*, Stockholmsklubbens medlemsblad, framförs några förslag till nya aktiviteter när verksamheten tar fart igen på hösten. Bland annat föreslås att intresserade regelbundet kan träffas på Esperanto-Centro för att ta del av alla de olika esperantotidningar från hela världen som kommer dit. Samtidigt kan man passa på att hålla "öppet hus" för nyfikna. De intressanta nyheter man hittar i tidningarna kommer sedan att vidare rapporteras till *La Espero* till fromma för rubriken "Ĉirkaŭ la mondo".

Ett annat förslag är bildandet av en särskild sånggrupp. Kanske blir det en hel kör av de skönsjungande stockholmsesperantisterna?

## Falköping gaje jubileis

La Esperanto-Klubo de Falköping festis sian 60-jaran jubileon per gaja festo en la region-domo de Luttra. Partoprenis preskaŭ cent gastoj el kaj najbaraj kaj foraj kluboj.

Ingvar Ericsson, la prezidanto, povis prezenti varian programon. La historia raporto informis pri 60 enhavoriĉaj jaroj. Precipe impona estis la ĝis nun 320-foja elsendado en la proksimradio.

SEF kaj multaj kluboj gratulis per donacoj. Venis ankaŭ leteraj salutoj el multaj anguloj de la mondo.

## Nova klubo

Ekestis nova esperantoklubo en Karlskoga. Ĝi nomiĝas la Eko. Ĝi estas tre aktiva kaj kunlaboras kun la popola alternejo.

## Tra la mondo

### Mono alvenis al Hindio

La klubo en Jönköping, kiu antaŭ kelkaj jaroj kolektis monon por la esperanto-movado en Hindio, nun sciigas ke ili finfine ricevis permeson transpigi la sumon al Hindio, ĉar Hindio fakte severe limigas alsendon da mono!

La mono certe estos bona helpo al la movado en Hindio.

### Kunlaboro kun Litovio

Litova Esperanto-Asocio dissendis leteron kun invito al komerca kunlaboro kun aliaj landoj. LEA volas helpi al litovaj kompanioj krei kontaktojn kun kompanioj en okcidentaj landoj.

Eksterlandaj entreprenoj, kiuj volas aĉeti aŭ vendi iun produkton povas skribi al Litova Esperanto-Asocio, SU-233000 Kaunas-C, ab. d. 167, Litovio, kiu klopodos trovi litovan entreprenon.

LEA ankaŭ povos prizorgi presadon de esperantlingvaj libroj aŭ aliaj presaĵoj en Litovio.

## Delegacio vizitis edukministron

Delegacio de Sveda Esperanto-Federacio, kun la nova prezidanto Roland Lindblom, vizitis la edukministron Göran Persson la 6-an de majo 1990.

La ministro kaj Bertil Bucht, fakulo pri lingvoj kaj internaciaj demandoj, ricevis informojn pri la eblecoj de esperanto kiel faciliga lingvo. Laŭ SEF instruado de esperanto faciligas postan lernadon de aliaj lingvoj.

### UK en Vieno – ne en Prago

Pro la nunaj cirkonstancoj en Ĉeĥoslovakio montriĝis neeble havi la venontjaran mondkongreson en Prago, kiel estis planite. Mark Fettes, redaktoro de la revuo *Esperanto*, informis la partoprenantojn de la gotenburga kongreso pri tiu bedaŭrinda fakto. Sed li povis ankaŭ aldoni, ke UEA elektis Vienon kiel novan kongresurbon por 1992. La aŭstraj esperantistoj akceptis la taskon, kvankam ili havas malmulte da tempo por la preparoj.



### Esperanto en universitato

La Universitato de Jyväskylä, Finnlando, ekhavas esperanton, kiel fakon. Pliaj informoj certe sekvos en *La Espero*.

# Esperanto-muzika studio establita en Stokholmo!

Plene ekipita, profesinivela studio, kie esperantomuzikistoj povos senhaste kaj eĉ senpage registri sian muzikon kun la helpo de kompetentaj teknikistoj kaj sonreĝisoroj. Tio estis la ŝajne utopia vizio de Vladimir Soroka, ĉefmotoro de la vigla kaj riĉa esperanto-muzika vivo en Sovetunio. Nun, post preskaŭ du jaroj de laboro kaj grandaj klopodoj, tio vizio realiĝis – en Stokholmo.

En la somero de 1989 Vladimir kaj lia ĉefa helpantino Oksana Kurpekova unuafoje vizitis Svedion, lige al la granda interŝanĝa projekto inter junularoj nordiaj kaj sovetia, "Next Stop", kiun inter aliaj organizoj partoprenis ankaŭ Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo. En Svedio ili rapide ligis intimajn kontaktojn kun precipe la stokholma junulara esperantoklubo La Ranetoj, kaj Stokholmo fariĝis bazo por la studia projekto. Ranetoj kaj multaj aliaj stokholmaj esperantistoj helpis pri loĝigo, dum Vladimir kaj Oksana

perlaboris monon per stratmuzikado kaj eksportado de i.a. brokantaj videoaparatoj al Sovetunio. Per persista laboro kaj severega ŝparemo, ili iom post iom amasigis la necesajn monajn rimedojn. Dume multaj svedaj esperantistoj havis okazon konatiĝi kun ili, i.a. kiel lertaj animistoj de kunkantado dum diversaj Esperanto-aranĝoj kiel KEF, kursoj en Kungälv kaj la ĵus pasinta SEF-kongreso en Gotenburgo.

Pro subite aperinta favora okazo oni nun aĉetis studion unu jaron pli frue ol planite. Ĝi situas en la plaĉa stokholma antaŭ-urbo Aspudden, je 12-minuta metroa veturo de la centro. Ĝian agadon financos komercaj servoj al ne-esperantaj muzikistoj. Dum la venonta jaro ĝi estos uzata precipe de la esperantaj rokbandoj Persone kaj Amplifiki, kiam ne okazos rekonstruaj laboroj. Ek de la aŭtuno 1992, Stokholmo sendube fariĝos la ĉefurbo por Esperanto-muzikistoj el la tuta mondo!

*Per Aarne Fritzon*

## Kalendaro

Aldonoj al la kalendaro en La Espero 2/1991

### JULIO

- 20–27 **Internacia Junulara Kongreso**, Karlskoga  
27 julio–3 aŭgusto **Universala Kongreso de Esperanto**, Bergen, Norvegio

### AŬGUSTO

- 1–7 **Internacia Junulara Semajno**, Szeged, Hungario (Lingvo-Studio, László Szilvási, pf 87, H-1675 Budapest, Hungario)  
24–31 **Internaciaj semajnoj**, Alpes, Francio (Esperanto, 5 rue du Docteur Roux, F-34000 Montpellier, Francio)

### SEPTEMBRO

- 21 **Literatura seminario**, Malmö. Gvidanto: Iva Åberg (Ann-Christine Kron Dahl, tel. 044-32 51 64).

### DECEMBRO

- 27 decembro–1 januaro **Internacia Festivalo**, Sensenstein, por mezaĝuloj sen aŭ kun infanoj. (IF, Platz, Pf. 1148, D-W-3501 Niedenstein, Germanio).

### MAJO 1992

- 22–24 **Sveda Esperanto-kongreso**, Oskarshamn.

## Alf Johansson

Alf Johansson, Lidköping, subite mortis, 70-jara. Li estis dum la 50-aj kaj 60-aj jaroj tre aktiva, varbante multajn adeptojn kaj gvidante plurajn kursojn. Li restis fidela ĝis sia neatendita morto.

*Åke Blomberg*



Min älskade och  
uppoffrande Syster

### Alfhild Lötman

\* 10 augusti 1905

har idag slutat sin  
jordevandring och gått  
till en ljusare värld.  
Saknaden är stor, men  
hennes minne lyser ljusst  
och vackert. I sorgen  
deltager släkt och  
vänner samt Linköpings  
missionsförsamling.

Linköping  
25 maj 1991  
MARGIT

*Du omsluter mig på alla sidor  
och håller mig i din hand.*

Psalt. 139:5

Begravningsgudtjänst har ägt rum.

Tänk på katastrofhjälpen till Bangladesh pg 51 00 5–7.



## Tri krimromanoj

*Corrado Tavanti kaj István Ertl: Tiu toskana septembro.* HEA, Budapeŝto 1990. 137 p.

Frue matene juĝisto Lamberti estas vokita al la telefono. En la proksima parko oni trovis la kadavron de junulino. Nokta tempesto forblovis la malnovajn foliojn kaŝantajn pakajon kun tiu terura enhavo.

Kiu kulpas pri tiu murdo? Grandparte la rakonto progresas dialogforme en facila stilo. La verkistoj donas iom neatenditan solvon. Esperable ili nur komencis longan kunlaboron

*Deck Dorval: Urd Hadda murdita!* Kvar viroj renkontiĝas en ŝlosita domo. Matene unu el ili estas murdita. Jen la enkonduko de la iom konfuzita murdokazo en teatra medio. La solvo ŝajnas al mi iom ne-

verŝajna, kaj mi pli ĝuis la pli fruan *Nigra magio*.

*István Nemere: Vi povas morti nur dufoje.* HEA, Budapeŝto 1989. 183 p.

Ĉu vi ŝatas streĉajn librojn kun baltalemaj, pafemaj "herooj", kiuj travivas nekredeble multajn malfacilajn situaciojn en la daŭro de nur kelkaj diurnoj? Ĉi tie vi trovas la aventuriston, kiu vivtenas sin per riskaj taskoj iom ekster la leĝoj. Viro ne sen homaj sentoj, ĉefe se temas pri belaj junulinoj.

Tiuspecaj libroj lavange publikiĝis en la libromarkato dum la lastaj jaroj; nun do ankaŭ en Esperantujo.

Streĉo, sango, mono kaj kelkfoje preseraroj estas la spicoj, kiuj tenas vin leganto ĝis la lasta paĝo.

*Anita Dagnarsdotter*

## Pecoj da vivo

*Spomenka Štimec: Vojaĝo al disiĝo.* HEA, Budapeŝto 1990, 90 p.

Spomenka Štimec estas talenta aŭtorino plej konata pro sia majstra romano *Ombro sur interna pejzaĝo*.

La novelaro *Vojaĝo al disiĝo* konsistas ĉefe el pli fruaj verkoj. Mi ege ĝuis legi la dudek du mallongajn novelojn – etudoj nomas ilin la eldonejo, sed pluraj el ili estas veraj perloj, pli maturaj ol la pliparto de esperanta literaturo.

SŜ laboras en ŝajne malvasta kadro, ĉiutaga, hejme, intima sfero, kaj ŝia tono estas persona, kvazaŭ ŝi parolus kun mi sola, trans kuirrejan tablon. En tiun varpon ŝi nature enteksas veŝton el la "granda vivo", amo, morto, angoro, milito, politiko. Mi pensas ekz. pri *Pacekzerco*, kie monda politiko drama infuziĝas en ŝian kuiradon de internacia manĝo, aŭ *Participo por la morto*, kie ŝi kun lingva leĝereco delikate komentas la plej seriozan.

Tri-kvar noveloj estas poste uzitaj en *Ombro sur interna pejzaĝo*. Komparante la du versiojn, mi konstatas, ke eĉ SŜ kapablis poluri sian stilon, kvankam ĝi jam komence imponis.

Tro multaj, kiuj verkas esperante, uzas la lingvon kiel mekanikan ludilon. SŜ estas malo de tiuj. Ŝia lingvo estas simpla sed riĉa, vivanta kaj elvokiva, kaj trafe spegulas la temon de ŝiaj tekstoj.

Por uzo en studrondoj "progresantaj" oni eldonis arojn da "Esperanto-historietoj" – mizeraj laŭ stilo, lingvo kaj enhavo. Kial ne altigi la ambicion uzante ekz. ĉi tiun novelaron de SŜ kiel legolibron? Anstataŭ senvalora rubo la studrondanoj ricevus pecojn da vivo en modela kaj persona lingvo, mallonge dirite: Literaturo! Domaĝe nur, ke pro la aĉa bindo de HEA mia legado rompis la dorson (ne la mian, sed tiun de la libro!)

Mi rekomendas tiun ĉi verkon al ĉiuj esperantistoj vivantaj!

*Sten Johansson*

## Parolhelpo kaj legohelpo

*Prof. Stanley Nisbet: Paroligiloj por progresintoj.* Eldonejo Kardo. Glasgow 1990.

Tiuj 17 teatraĵetoj de diversaj temoj kaj situacioj kun du personoj interagantaj en konversacioj aŭ diskutoj ŝajnas esti tre utilaj kiel parolhelpo por tiuj kiuj povas legi kaj skribi Esperanton, sed pro manko de praktiko ne povas paroli tiel flue kiel ili dezirus.

Sub ĉiu ekzerco troviĝas pluraj elirvortoj, kiuj koncernas la temojn kaj kiuj stimulas la fantazion. La temoj estas de ordinara socia vivo, engaĝas la sentojn kaj sekve helpas la parolojn.

Tre utilaj por studrondoj kaj klubaj kunvenoj.

*Karl-Gustaf Gustafsson: Kompendium till Gerda Malaperis.* Skövde 1990. 44 s. 60 kr.

En ordlista med grammatikanvisningar till Gerda malaperis har tidigare funnits på engelska, franska, portugiska och holländska. Karl-Gustaf Gustafsson har nu gett ut ett liknande material på svenska. Tanken är att man vid självstudier ska kunna använda boken direkt med kompendiet.

Undertecknad som använt Gerda malaperis som läsebok i fortsättningscirkel och nu studerat kompendiet tillsammans med boken tycker att det kan vara en bra modell. Har man grammatiken i färskt minne, går det säkert lätt, men om inte så rekommenderar jag att man använder boken i studiecirkel med språkleddare.

Gerda malaperis är uppbyggd med tanke på språket: i början med mycket ordrepetitioner i olika sammanhang och senare med affixkonstruktioner, som ger övning för läs- och hörförståelse. Genom spänning i berättelsen motiveras man också att fortsätta läsningen.

*Ingrid Ottosson*

Sten Svenonius  
Erikstorpsgatan 26 A  
21754 Malmö

Esperantoförbundet, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm

## Por specialisto kaj amatoro

*Masayuki Saionju: Orienta speciala diina masaĝo. Koksostoĝustiga premkneda terapio. Xue Yuan eldonejo, Pekino 1989. 191 p.*

Kiu ne havas intereson pri sia propra sano? Orienta speciala diina masaĝo tre interesis min legi ĝis la fino de la libro. Kvankam multaj fakaj (medicinaj kaj anatomiaj) terminoj aperas, oni sufiĉe bone povas kompreni helpe de la ilustraĵoj. Laŭ Masayuki Saionju nur 0.1% de la

homoj havas normalajn koksojn, kaj la koksosta delokiĝo ĉe 99% de la suferantoj estas denaska.

En ĉi tiu libro oni trovas kialon de diversaj malsanoj kaj kiel solvi la problemon laŭ Masayuki Saionju. Eĉ se oni havas malgrandajn sanproblemojn, se oni ne bone fartas, aŭ se oni estas tro dika aŭ tro maldika, oni trovas ankaŭ ĝustan vojon prihelpi tiajn ĉiutagajn malgrandajn problemojn. Masayuki montras multajn diversajn ekzemplojn, kiujn li kuracis per sia terapio. Samtempe li insistas ke koksostoĝustiga premkneda terapio estas la plej ideala natura terapio, ne nur por kuraci

malsanojn kiel kardiovaskulaj, spiraj, digestaj, urinogenitalaj, sensaj kaj movaj, haŭtaj kaj mukozaj, ginekologiaj kaj infanaj malsanoj ktp, sed ankaŭ por preventi kontraŭ diversaj malsanoj efikas ĉi tiu terapio.

Post 20-minuta ekzercado de "Memtreja premkneda gimnastiko Diino Bics", mi rimarkis grandan diferencon ĉe mia ĉiutaga problemo. La plej grava punkto estas ke ĉi tiu libro donas al legantoj ŝancon pripensi kio estas la plej baza funkcio de la homa korpo kaj kiamaniere oni povas funkciigi sian korpon por ke ĝi funkciu normale.

## SEJU

La Ranetoj kaj la Esperantoklubo de Stokholmo invitas al la tradicia somerfina junulara semajnfino en


### Barnens Ö

(Insulo de l' infanoj)

23-a ĝis 25-a de aŭgusto 1991

#### "Barnens Ö" signifas:

Maron, arbaron, berojn, saŭnadon, noktajn te-diboĉadojn, studrondojn, naĝadon, bakadon, pilkludojn, senplanan babiladon, verkistan seminarion, stelplanan ĉielon en silenta nokto. Kaj multe pli...



#### Kiel atingi la ejon:

Apud la stokholma metrostacio Tekniska högskolan oni prenas iun el la subaj busoj al la urbo Norrtälje (ĉ. 70-minuta veturo), kaj tie ŝanĝas al alia buso ĝis Barnens Ö (ĉ. 50-minuta veturo). Petu la ŝoforon ellasi vin ĉe la haltejo "Barnens Ö - Centralbryggan". La ĉi-jara kabano nomiĝas "Cervinska hemmet", telefonnumero 0176/931 61.

#### Kotizoj (inkluzive ĉion):

Svedoj	300 SEK
Ceteraj eŭropanoj	250 SEK
Ekstereŭropanoj	200 SEK

Aliĝu pagante la kotizon al la poŝtgira konto de La Ranetoj:  
8 88 02 - 4

**Aliĝu nun! Bonvenon!**

#### La busoj vendrede 23/8:

11.05 buso 640 ĝis Norrtälje, ŝanĝo al buso 636  
15.05 buso 640 ĝis Norrtälje, ŝanĝo al buso 636  
17.05 buso 640 ĝis Norrtälje, ŝanĝo al buso 636 (Notu! La lasta!)

#### La busoj sabate 24/8:

07.35 buso 367 ĝis Norrtälje, ŝanĝo al buso 636  
15.05 buso 367 ĝis Norrtälje, ŝanĝo al buso 636

Kunportu littolaĵon aŭ dormsakon. Indiku aliĝante se vi volas manĝi vegetarane.

Demandoj ktp. al Per Aarne/Lena, tel.: 08/97 47 76